






№ 01  
1965

G.L. GHELLI

ITALIA

Organo  
Associazione  
Italiana  
Ferrovieri  
Esperantisti

ferroviario





INVITO AI FERROVIERI

Le Nazioni Unite hanno proclamato il 1965 "Anno della Collaborazione Internazionale" per favorire la collaborazione fra i popoli con lo scopo di eliminare le tensioni internazionali e consolidare la pace nel mondo.

I ferrovieri, sulle rotaie che collegano le nazioni, hanno più occasioni di sperimentare che la diversità delle lingue rappresenta uno degli ostacoli più seri al rafforzamento e allo sviluppo della collaborazione internazionale.

Prendendo in considerazione la Risoluzione del 10 dicembre 1954, con cui la Conferenza Generale dell'UNESCO ha riconosciuto "i risultati raggiunti a mezzo dell'Esperanto nel campo degli scambi internazionali e per l'avvicinamento dei popoli", invitiamo tutti i ferrovieri italiani a studiare l'Esperanto e ad aderire alla nostra Associazione.

Il numero degli aderenti alla nostra Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti cresce lentamente ma continuamente: dai 56 Soci del 1955, ai 66 del 1956, ai 73 del 1957, ai 74 del 1958, ai 81 del 1959, ai 89 del 1960, ai 92 del 1961, ai 98 del 1962, ai 103 del 1963 ed ai 107 del 1964. Nel giro di 10 anni il numero dei Soci è pressochè raddoppiato, ma su 170.000 dipendenti dell'Amministrazione delle F.S., che un esiguo numero ha compreso l'importanza del problema linguistico negli scambi internazionali e della diffusione della Lingua Esperanto! FERROVIERI STUDIATE L'ESPERANTO!  
ADERITE ALL'I.F.E.A.!

AVVISO DEL CASSIERE

Si è chiuso l'anno solare ed ancora molti dei nostri Soci non hanno versato la quota per il 1965. Non avendo ricevuto avviso di dimissioni dovremo rinnovare e quindi pagare, alle Associazioni di cui siamo aderenti, le quote per i Soci degli anni scorsi, per cui preghiamo vivamente tutti ad inviare le quote urgentemente a mezzo del C.C.P.n°8/24094, oppure due righe di dimissione. Rammentiamo che le quote per il 1965 sono £.2500 o £. 1000.

Chi riceve il presente "INFORMA BULTENO-ITALA FERVOJISTO" e non intende riceverlo ulteriormente, e non ha interesse al nostro movimento è pregato di farlo presente alla redazione: Via Donato Creti, 61 Bologna. Grazie anticipate. VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE SOCIALI! SOSTENETE L'I.F.E.A.!

17-a INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO

HAMAR (Norvegujo), 22 - 28-5-1965

Korespondadreso: Poŝtkesto 61, LØTEN (Norvegujo).

Bankkonto: 300/924 Vangs Sparebank, HAMAR (Norvegujo).

Telefono: 271 LØten aù 22159 Hamar.

ANTAUKONGRESPROGRAMO: Vendrede 21-5-1965, Posttagmeze: Ekskurso en Oslo por tiuj kiuj travojaĝos la norvegan ĉefurbon survoje al Hamar. Tranoktejo en Oslo por la nokto 21-22.5 mendebla per la aparta aliĝilo. Prezo Ĉa.Nkr.25.

POSTKONGRESAJ VOJAĜOJ EN SUDA NORVEGUJO:

ALTERNATIVO 1: Trans la fjordoĵ de la okcidenta landparto. - Prezo Nkr.290  
29-5: h. 11,20 de Hamar per trajno. Lunĉo en restoracivagono. h.18,30 alveno al Andalsnes. Tagmanĝo kaj tranoktado en Setnes junulargastejo.

30-5: Matenmanĝo kaj lunĉo. h.14,15 de Setnes junulargastejo per aùtobuso, h.16,30 alveno al Valldal, ŝanĝo al pramŝipo. h.17,30 alveno al Stranda, ŝanĝo al aùtobuso. h.18,30 alveno al Hellesylt, tagmanĝo kaj tranoktado en Hellesylt junulargastejo.

31-5: Matenmanĝo, h.12,00 de Hellesylt per aùtobuso. h.15,00 alveno al Olden Kunportita manĝaĵo por la vojaĝo, h.15,05 de Olden, h.17,15 alveno al Jølster. Tagmanĝo kaj tranoktado en Skei hotelo.

1-6: Matenmanĝo, h.11,15 de Jølster per aùtobuso al Vadheim, alveno h.14,15 h.15,10 per ŝipo al Bergen, lunĉo kaj tagmanĝo en la ŝipo. h.21,30 alveno al Bergen. Tranoktado en junulargastejo.



2-6: Matenmanĝo kaj lunĉo, h.11,20 ekskurso en la urbo. Tagmanĝo en la restoracio sur monto Fløyen. Tranoktado en junulargastejo.

3-6: Matenmanĝo, h.9,50 de Bergen per trajno. Lunĉo en la restoracivagono. alveno al Oslo Ø. h.19,40.

ALTERNATIVO 2: Montara kaj fjorda vojaĝo. - Prezo Nkr. 165,-

29-5: h.5,10 de Hamar per trajno, alveno al Oslo Ø. h.7,16. h.9,50 de Oslo Ø. per trajno. Tagmanĝo en la restoracivagono. Ŝanĝo de trajno en Myrdal. h.17,35 alveno al Flåm. Aŭtobuso al Aurland junulargastejo. Vespermanĝo kaj tranoktado.

30-5: Matenmanĝo, h.8,00 de Aurland per ŝipo, h.11,00 alveno en Gudvangen. h.11,20 per aŭtobuso al Voss, kie alveno je h.13,10. Tagmanĝo. h.17,55 per trajno al Bergen. h.19,55 alvenos en Bergen. Vespermanĝo en la restoracivagono. Tranoktado en junulargastejo.

31-5: Matenmanĝo. h.9,- ekskurso, tri horoj per aŭtobuso. h.13,- lunĉo en la restoracio sur monto Fløyen. Vespermanĝo en la stacidomrestoracio. h.21,- per trajno dormvagono al Oslo Ø. Alveno tie 1-6 je h.7,20.

ALTERNATIVO 3: Laŭ la bordo de Norvegujo. - Prezo Nkr. 325,-

29-5: h.11,20 de Hamar per trajno. Lunĉo en la restoracivagono. h.20,20 alveno al Trondheim. Vespermanĝo kaj tranoktado en Singsaker hotelo.

30-5: Matenmanĝo, h.10,- ekskurso, h.13,30 lunĉo. Tagmanĝo. h.20,- per ŝipo en 2-a klasa kajuto.

31-5: Ĉiuj manĝojen la ŝipo. oni povas albordiri dum restado en la havenoj.

1-6: h.6,- alveno al Bergen. Matenmanĝo en la junulargastejo. h.10,- ekskurso. h.13,30 lunĉo en la restoracio sur monto Fløyen. Vespermanĝo kaj tranoktado en la junulargastejo.

2-6: Matenmanĝo. h.8,45 per trajno, lunĉo en la restoracivagono, al Oslo Ø. je h.19,48.

En la prezoj estas enkalkulita pago por sid- kaj dormlokoj en trajnoj 2-a klaso, tranoktadoj, manĝoj, aŭtobus- kaj ŝipbiletoj, sed ne trajnbiletoj, kaj elspezoj al vojaĝgvidanto. Sendu vian aliĝilon tre frue, kaj nepre antaŭ la 10-4-1965. Mendu ĉe ODD KOLBREK, Kaldbakkstubben, 22 Oslo 9 Norvegujo. Bonvolu aldoni 2 internaciajn respondkuponojn.

=====  
TRILANDA PASKA RENKONTIĜO EN TRIESTE  
=====

La Itala Esperantista Junularo havas la plezuron inviti Vin al ĝia unua aranĝo de la 17-a ĝis la 19-a/4/1965. Jen la programo en ĝiaj esencaj punktoj

17-4 Sabato: Alveno de la partoprenantoj. Vespermanĝo. Prelego.  
18-4 Dimanĉo: Matenmanĝo kaj libervola ĉeesto al Paska Diservo. Prelego de S-ano Svobodan Zlatnar. Tagmanĝo. Ekskurso kun vizito al Giganta Groto. Vespermanĝo kaj amuza vespero.

19-4 Lundo: Matenmanĝo. Prelego. Vizito de la urbaj vidindaĵoj per aŭtobuso. Tagmanĝo. Renkontiĝo en la sidejo de T.E.A. por la adiaŭo.

Prezo: Lit.6000 po persono, inkluzivas: kompletan restadon ek de la vespermanĝo de la 17-4 ĝis la tagmanĝo de la 19-4. Aliĝkotizo: Lit.700 po persono ĝis la 28-2. Lit.1000 post la 1-3.

Al la renkontiĝo partoprenos respondeculoj kaj gejunuloj de Aŭstria Esperanto Junularo kaj de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kiu aktive kunlaboros al la prelegoj kaj amuza vespero.

Ne manku travivi la unuajn spertojn de I.E.J. Pro organizaj aferoj ni varme petas plej rapide aliĝi, kaj se eblas antaŭpagi la tutan restadon.

LA BRITA ĈEFMINISTRO WILSON LERNIS ESPERANTON

Laŭ informoj de nia kara amiko A.Horace Barks, la nuna brita ĉefministro H. Wilson, tiutempe prezidanto de la Laborpartio, en julio 1961 vizitis Stoke-on-Trent, neforgesebla sidejo de nia antaŭlasta kongreso, okaze de cerimonia ĉe la loka sekcio de la Laborpartio. Rimarkinte la verdan stelon ĉe S-ro Barks, H. Wilson tuj salutis lin en la internacia lingvo. Poste li klarigis angle, ke li lernis Esperanton kiel skolto.

NE ATENDU! PAGU TUJ VIAN JARKOTIZON AL I.F.E.A.!



ESPERANTA KARAVANO AL PALESTINO = GRAVA ALVOKO

Por la inauguro de la "PATRO NIA" panelo, sur la Monto de la Olivarboj en JERUSALEMO (Jordanio) kaj la panelo esperantlingve "MAGNIFICAT" en Ain Karem (Israelo), oni aranĝas esperantan karavanon (unu aŭtobuso kaj 48 partoprenantoj) de la 26-a de aŭgusto ĝis la 19-a de septembro 1965-a. Vojaĝo TERE kaj ŜIPE. Jen interesa iniciato, ĉar ĉiuj esperantistoj ankaŭ nekatolikaj, devas konsideri kiel gravan aferon estas la elmontrado al la araba popolo de nia lingvo internacia kaj klopodi por ke Esperanto fariĝu en la estonto la dua komprenilo por la arabaj popoloj. Estos invitita reĝo Hussein. KOTIZOJ: 165.000 lirojn plus 10.000 por aliĝo plus 10.000 por vizoj - ENTUTE: 185.000 italajn lirojn.

La sumo inkluzivas: vojaĝo per komforta aŭtobuso de Venecio al Jerusalemo kaj Ŝipe de Haifa al Venecio - plenkursio en unuarangaj hoteloj (sen trinkaĵoj) - ekskursoj, vizitoj al monumentoj, muzeoj, moskeoj k.t.p. ĉiuj trinkmono. Oni trapasas interesajn regionojn, dezertojn, oazojn. Interesega ŝipveturado sur la Bosforo. La tutan Palestinon oni vizitas per taksioj. La esperantistaro de la urboj kie ni haltas, akceptos kaj festos nian karavanon. Jen la regionoj kiujn ni trapasos: Jugoslavio, Bulgario, Turkio, Sirio, Libano, Jordanio, Israelo, Cipro kaj Grekio.

ĈU NE ESTAS VERE ALLOGA PROGRAMO?

Petu informojn al Prof-ino Rosa MAUDENTE Via Belmeloro, 7 BOLOGNA (Italio) Telefonnumero 230.869, kiu sendos presitan programon esperante aŭ itale. La aliĝon de 10.000 liroj oni sendas al: Commissariato di Terra Santa, Venezia, S. Francesco della Vigna. Poŝtĝironto 9/4728 NEPRE indiku "POR LA ESPERANTA PILGRIMADO-TERE-ŜIPE-26/8-19/9/1965".

Pasporto: por Jugoslavio, Bulgario, Turkio, Sirio, Libano, Jordanio, Cipro, Grekio. NE ISRAELO. La "Commissariato" aranĝas apartan dokumenton. Estas malpermesata la trapason por la pasportoj kiuj enhavas ĉi tiun landon. Por la vizoj zorgos la "Commissariato".

Por eksterlandanoj donos informojn Prof-ino MAUDENTE, por faciligi iliajn aliĝojn. ATENTU: LIMDATO POR LA ALIĜO: LA 1-an DE MAJO 1965

La restantan sumon oni sendos unu monato antaŭ la forveturo, kune kun la pasporto kaj 6 fotoj.

ARANĜO por kiuj ne povas vojaĝi tiel longe. Ili vojaĝu aviadile ĝis Jerusalemo, kaj Ŝipe el Haifa, ĉar estas malpermesata la transiro de la jordana-israela landlimo dufoje. Restado en Palestino kaj vizitoj, ekskursoj k.t.p. kune kun la aliaj pilgrimantoj, plenkursio sen trinkaĵoj, oktaga restado 50.000 lirojn. Rendezuo en Jerusalemo la 7-an de septembro ĝis la 14-a en Haifa. De Haifa estas multnombraj ŝipoj al Italio.

INAŬGURO DE LA ESPERANTO-MONUMENTO

LINZ (Aŭstrio) atendas vian viziton okaze de la inaŭguro de la Esperanto-monumento la 9-an kaj 10-an de julio 1965-a. Korespondadreso: S-ro Joh. Geroldinger, Markusgang 7 LINZ/D. (Aŭstrio).

26 TAGOJ EN MALPROKSIMA ORIENTO

JAPANUJO, HONG KONG, BANGKOK, DELHI, TEHERAN. Flugante per "AIR FRANCE" De la 30-a de julio ĝis la 25-a de aŭgusto 1965-a. Okaze de la 50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - TOKYO 1965.

Prezo de la 26 tagoj de ekskurso: Italaj liroj 600.000,-. Vojaĝo per flugilo "Boeing 707 Intercontinental" de Milano al Tokyo kaj de Tokyo al Hong Kong, Bangkok, Delhi, Teheran, Roma.

Oni proponas ankaŭ aliajn du eblecojn:

- a) 18 tagoj de ekskurso de la 30-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto: Prezo italaj liroj 540.000,-.
- b) 12 tagoj de ekskurso de la 30-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto; Prezo italaj liroj 505.000,-.

Petu itallingvan prospekton kun detala programo al: ITALA ESPERANTO-FEDERACIO Via Po, 7 TORINO (Italio)



LA PROPONO AL U.N OKAZE DE LA JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO

Ĉiuj esperantistoj havas la precizan taskon kunlabori, en ĉi tiu, granda kampanjo; ĉu vi, kara leganto, jam disponas pri la folioj por la subskriboj kaj ĉu vi jam eklaboris? Jen kelkaj sugestoj de U.E.A.:

1. Se vi ankoraŭ ne havas la foliojn, bonvolu tuj peti plurajn ekzemplerojn de via landa asocio, faka organizaĵo, ĉefdelegito aŭ peranto, aŭ rekte de C.O. en Rotterĉdam. Antaŭ ol komenci la kolektadon, bonvolu legi kaj poste atente observi la instrukciojn dorsflanke de ĉiu folio.
2. Unuavice bonvolu subskribi mem kaj peti la subskribojn de ĉiuj viaj familianoj kaj gekonatoj.
3. Se iu el viaj familianoj aŭ gekonatoj montras apartan interesiĝon, petu lin aŭ ŝin kolekti inter siaj gekonatoj kiel eble plej multajn subskribojn.
4. Se en via lando estas kutimo sendi bondezirojn okaze de iu festo (ekzemple okaze de Kristnasko aŭ Novjaro) vi taŭge povus aldoni kelkajn vortojn pri la signifo de la Jaro de Internacia Kunlaborado, pri la rolo de la internacia lingvo kaj, aldonante unu aŭ plurajn foliojn, pe i pri kolektado de subskriboj.

BELARTAJ KONKURSOJ

- Literatura sekcio: 1) Originala poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 p.)  
2) Tradukita poezio (maksimume 108 versoj per 1 ĝis 3 poemoj).  
3) Originala prozo (novelo, eseo; artikolo, aŭ simile; ĉiuj prozaĵo po 2000 + 3000 vortoj).  
4) Originala drameto (ĉu por sceneja prezento, ĉu en formo de radio-dialogo; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).

Rajtas konkuri: Kiu aliĝis al 50-a U.K. aŭ kiu estas individua membro de UEA.

Konkursa Kotizo: 3 internacia respond-kuponoj maldekstre stampitaj de la poŝto.

Sendo de la Konkursaĵoj: Oni sendu 4 ekzemplerojn de ĉiu verko (laŭeble maŝinskribitaj), kaj en kazo de traduko, ankaŭ 4 ekzemplerojn de la originalo. Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo la nomon de la branĉo, por kiu ĝi estas destinita kaj pseŭdonimon, kiu efike kaŝas la nomon de la aŭtoro. Oni skribu sian nomon kaj adreson sur aparta slipo kun la pseŭdonimo kaj kur. kongresnumero aŭ membrokarko de U.E.A.

Limdato: Antaŭ la 31-a de marto 1965, ĉio devas esti sendita al S-ino E. Lappenna, Nova Ves 32 ZAGREB (Jugoslavio).

Premioj: 1-a premio 100 Nederlandaj guldenoj; 2-a premio 70 Ned.gld.; 3-a premio 40 Ned.gld.; por la premio "Nova Talento" 70 Ned.gld.

Italaj gesamideanoj! Partoprenu la belartajn konkursojn kunlaboru por la evoluigo de nia literaturo!

KOMERCŜIPO KUN ESPERANTA NOMO

Temas pri la iama franca fiŝkaptata ŝipo 600 tuna "Jacques Cartier". Ĝi estis vendita en Italujo kaj niaj leĝoj postulis ĝian alinomigon. Laŭ sugesto de Samideano S-ro Bisesti el Genova, la mara departemento de La Spezia akceptis la nomon "A G L O". La ŝipo apartenas nun al Kap. Di Donna Pasquale el Torre del Greco (Napoli), kaj plenumas la rolon de komerca ŝipo inter la italaj havenurboj.

INSTRUISTOJ POR AFRIKO

UNESKO-INFORMOJ: Laŭ "Unesco Features" kaj Informa Servo de U.E.A.:

La tria eldono de "Instruistoj por Afriko", ĵus eldonita de Unesko, listigas vakajn oficojn por lernojaro 1964-65 en afrikaj duagradaj kaj pli altaj lernejoj. Entute prezentiĝas 1300 vakoj en 21 landoj, laŭ du sekcioj: unue tiuj en universitatoj, kaj due tiuj en aliaj lernejoj.

Kandidatoj turnu sin al la landaj varbo-centroj, jam establitaj en 40 el la 116 Ŝtatoj-membroj de Unesko.

INTERNACIA AŬTOMOBIL-EKSPOZICIO EN TORINO

Dum la Internacia Aŭtomobil-Ekspozicio en Torino, ĉe la centra stando de FIAT deĵoris Esperanto-interpretistino, S-ino U. Grattapaglia. Oni disdonis al la vizitantoj centojn da faldfolioj en Esperanto pri la nova "F.I.A.T.-850".



ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA-ESPERANTO. Casella Postale 320 Roma, Italia.

La dissendoj okazas de h.18,55 ĝis h.19,10 (M.E.T.) = Ondlongoj: M.31,33 =Mc/s.9,57; m.41,47 =Mc/s.7,23; m.50,34 =Mc/s.5,96. Prelegantoj: marde kaj merkrede: S-ro Kav. Luigi MINNAJA; vendrede: Prof.D-ro V.MUSELLA.

DISSENDOJ EN ESPERANTO - Jaro 1965-a

M A R T O 1 9 6 5 - a

1972 mardon la 2-an: Tra la literaturo  
1973 merkredon la 3-an: Kuriero de Esperanto  
1974 vendredon la 5-an: Italaj provincoj: La Spezia  
1975 mardon la 9-an: Novaĵoj el Italujo  
1976 merkredon la 10-an: Kuriero de Esperanto  
1977 vendredon la 12-an: La Skolastiko kaj S-ta Tomaso el Aquino  
1978 mardon la 16-an: Italaj kanzonoj en Esperanto  
1979 merkredon la 17-an: Kuriero de Esperanto  
1980 vendredon la 19-an: La "Dia Komedio": Infero  
1981 mardon la 23-an: Leterkesto  
1982 merkredon la 24-an: Kuriero de Esperanto  
1983 vendredon la 26-an: La "Dia Komedio": Purgatorio  
1984 mardon la 30-an: Kristana mondo  
1985 merkredon la 31-an: Kuriero de Esperanto

A P R I L O 1 9 6 5 - a

1986 vendredon la 2-an: La "Dia Komedio": Paradizo  
1987 mardon la 6-an: Tra la literaturo  
1988 merkredon la 7-an: Kuriero de Esperanto  
1989 vendredon la 9-an: Italaj belartaj urboj: Parma  
1990 mardon la 13-an: Novaĵoj el Italujo  
1991 merkredon la 14-an: Kuriero de Esperanto  
1992 vendredon la 16-an: La "Mesio" de G. F. Händel  
1993 mardon la 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto  
1994 merkredon la 21-an: Kuriero de Esperanto  
1995 vendredon la 23-an: Epizodoj de la "Dia Komedio": Uliso  
1996 mardon la 27-an: Leterkesto  
1997 merkredon la 28-an: Kuriero de Esperanto  
1998 vendredon la 30-an: Italaj Nobel-premiitoj: Grazia Deledda

La Fakestro: L. MINNAJA

PAROLAS LA POLA RADIO = VARSOVIO

Programo de la Elsendoj en Esperanto - Oktobro 1964-Aprilo 1965

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la h.16,30 ĝis la h.17,00 laŭ la mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto sur jenaj ondoj: m.31,01 =kc/s.9675; m.31,45 =kc/s.9540; m.41,18 =kc/s.7285; m.41,99 =kc/s.7145; m.42,11 =kc/s.7125; m.48,90 =kc/s.6135; m.50,42 =kc/s.5950; kaj sur la meza ondo m.200 =kc/s.1502. Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn.

LUNDE: Felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, ofte ankaŭ priesperanta temo; ĉiun duan semajnon: "Scienca tribuno".

MARDE: "Kultura notlibro" kaj dufoje monate "Vortmuzika elsendo" prezentanta polan muzikon kaj muzikistojn; ĉiun unuan mardon de monato: "Anguleto de blindaj esperantistoj".

MERKREDE: Felietono "Pri kio oni parolas en Pollando" kaj "Koncerto kun bondeziroj", ĉiun trian merkredon de monato: "Radia Film-Magazino".

ĴAŬDE: Komentario pri internaciaj temoj kaj "Leterkesto", en kiu la Redakcio respondas al leteroj de aŭskultantoj; ĉiam la trian ĵaŭdon de monato - anonco de rezultoj de la konstanta "Konkurso por plej interesa letero".

VENDREDE: "Literatura rubriko". Vi trovos en ĝi fragmentojn el pola kaj esperanta literaturo originala kaj tradukita, felietonojn pri esperantaj temoj kaj ankaŭ eseojn pri literaturaj temoj.

SABATE: Sonrevuo "La semajno en Pollando", kiu entenas sonigitajn raportojn pri tutpollandaj okazintaĵoj en koncerna semajno.



DIMANĈE: "Panoramo de internaciaj eventoj" kaj esperantista magazino "Sub la verda stelo", en kiu vi povas trovi novaĵojn el la tuta Esperantujo, intervjuojn, recenzojn, esperantajn kanzonojn kaj humoraĵojn. Krom tio ĉiutage novaĵoj el la mondo kaj el Pollando. Ĉiujn ĉiujn aŭskultantojn ni petas sendi rimarkojn pri la enhavo kaj formo de niaj disaŭdigoj kaj ankaŭ pri ti es aŭdebleco. Adreso: POLA RADIO, Esperantaj Disaŭdigoj, VARSOVIO, Pollando.

#### RADIO SOFIA = DISAŬDIGOJ EN ESPERANTO

Radio-Sofia disaŭdigas en Esperanto ĈIUDIMANĈE de h.19 ĝis 19,25 laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: m.39,11 =kc/s.7670, m.48,62 =kc/s.6170.

La disaŭdigo estas ripetata la saman vesperon de la 23,30 ĝis 23,55 horo laŭ la horsistemo de Greenwich. Ondoj: m.41,35=kc/s.7255, m.48,62=kc/s.6170.

En niaj disaŭdigoj vi povas aŭdi novaĵojn, komentariojn pri enlandaj kaj eksterlandaj demandoj, raportaĵojn kaj prelegojn pri la ekonomia kaj la kul tura vivo en Bulgario, bulgaran popolmuzikon, kaj ĉiun unuan dimanĉon de la monato - nian Poŝtkesto. Viajn leterojn kun demandoj, opinió kaj sugestoj sendu al adreso: RADIO-SOFIA, Disaŭdigoj en Esperanto, SOFIA, Bulgario.

#### R A D I O P R A H A

Radio Praha regule disaŭdigas esperantlingve la lastan ĵaŭdon de ĉiu mo nato sur mezondo m.233,3 =kc/s.1286 en programo de la 18,15-19, ĉiam 10 mi nutoj antaŭ la 19-a horo.25-2-1965- JUNA GENERACIO EN ESPERANTO-MOVADO 25-3-1965- VOJAĜIMPRESOJ EL JUGOSLAVIO. Horoj laŭ mezeŭropa tempo.

Skribu al ni pri aŭdebleco de niaj Esperanto-elsendoj en via lando kaj sciigu pri ili ankaŭ viajn eksterlandajn geamikojn. Ĉiam ni ŝate legos viajn leterojn, sugestojn, proponojn por niaj venontaj programoj. Ĝis reaŭdo, ka raj geamikoj! RADIO PRAHA, Esperanto-Elsendo, PRAHA, Ĉeĥoslovakio.

#### R A D I O P E K I N O

Ekde la 10-a de decembro 1964 RADIO-PEKINO regule dissendas en Esperanto duonhoron dufoje semajne. La programoj okazas ĉiun vendredon kaj sabaton de la 20-a ĝis la 20,30 horo (tempo de Greenwich) sur la ondolongoj: m.51=kc/s. 5880; m.40,4 =kc/s.7440; m.30,1 =kc/s.9955 kaj konsistas el informoj kaj mu ziko. La sabata programo estas ripeto de la vendreda. Rimarkoj pri aŭdebleco estas sendotaj al RADIO-PEKINO, Esperanto-Pako, Pekino, Ĉinio.

#### ALVOKO AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ EN TUTMONDO

Komence de ĉi tiu jaro Svisa Kurtonda Radio ricevis novan direktoron. Po st tio sekvis likvido de la elsendoj en Esperanto ĉe Svisa Kurtonda Radio Bern. Por atingi rekonsideron de tiuj elsendoj mi alvokas la tutan esperan- tistaron, skribu senprokraste al: SCHWEIZERISCHE RADIO- UND FERNSEHGESELL- SCHAFT Kurzwellendienst Esperanto-Programo Giacomettistr. 1 3000 BERN (Svis lando) kaj demandu ĝentile kial oni ne plu elsendas en Esperanto. - Petu an kaŭ viajn amikojn kaj korespondantojn ke ankaŭ ili skribu nepre al Svisa Ra dio. Kunhelpu ankaŭ vi, ke la esperantistoj prezentu imponan demonstracion al la direkcio de Radio Svislando!

#### ==ESPERANTO EN VATIKANA RADIO==

Pastro Giacinto Jacobitti, estas faranta kampanjon, por ke el ĉiu mondpa rto alvenu petoj al la Papo por enkonduko de Esperanto en la Vatikana Radio. La medio estas iom preparita, sed ni devas doni palpeblan pruvon al la Papo pri la tutmonda disvastiĝo de Esperanto kaj pri la sincera deziro de tiu el- sendo. Bonvolu do ankaŭ vi en via sfero, helpu tiun iniciaton invitante vi- ajn gekorespondantojn skribi esperante al la Papo

Sugestoj por la letero al la Papo. Sanktega Papa Moŝto. Temo de la letero: Esperanta disaŭdigo de la Vatikana Radio pri regulaj informoj kaj programoj. Aspiro de milionoj da katolikaj kaj ne-katolikaj esperantistoj, kiuj deziras aŭdi per la lingvo Esperanto, kiu interkomprenigas ĉiujn popolojn, la voĉon de la Centro de la Katolikismo. Dekkvino da Ŝtatoj kaj dudeko da radio-sta- cioj uzas regule Esperanto kun larĝa profito, tiel ke diversaj registaroj financas ĝin por sia propagando. Multaj radio-stacioj krom nacilingve, ankaŭ Esperante dissemas misverojn kaj erarojn pri religio kaj socia moralo...

La letero ne estu sendata al Vatikano, sed al R.P.Giacinto JACOBITTI, Piazza S.Maria Maggiore, 8 ROMA (Italia)